

FRINGOJ 2013

La kastelo Grezijono (Maine-et-Loire) jam havas longan tradicion de esperanto-staĝoj, ŭ por plenkreskuloj, ŭ por infanoj. FRINGOJ, estas novstila por-geknaba semajno, kiu sukcese disvolviĝs unuafoje en aprilo 2006. Komprenoble, ĝ celas kontribui al plialtigo de la lingva nivelo, sed ankaŭ ambicias evoluigon de la partoprenantoj al pli da komunikemo, aktivemo, kreemo kaj memfido en ĝja internacia etoso.

Nia programo konsistos el

PREPARO DE BELA FESTO

kun spektaklo, ekspozicio..., en kiu ŭu preparos tion, kion li aŭ ŝ plej ŝatas.

La festo okazos vendrede, la lastan vesperon, kaj estos malfermata al ekstera publiko, esperantista aŭ ne. La urbestro kaj ĵurnalistoj estos invitindaj.

Grupo-gvidontoj,

la organizantoj atentigas vin pri 3 gravaj punktoj :

- 1) Bonvolu ekrlati kun ni kiel eble plej frue, eĉ se vi ankoraŭ ne scias precize la nombron de partoprenantoj.
- 2) Bonvolu pripensi ekde nun, kiujn aktivaĵojn vi ŝatus proponi.
- 3) Bonvolu klopodi por ke la nunaj komencantoj akiru minimuman konversaci-kapablon antaŭ la renkontiĝo.

Elizabet' Barbay - 25, allée Gabriel Faure – FR 93140 BONDY
Tel : +33 (0)1 48 47 23 87 - eliz.babay@wanadoo.fr

Kastelo Gresillon - FR - 49150 BAUGE – kastelo@gresillon.org



en Grezijono

2013



<http://gresillon.org>

Festa Renkonto Internacia de Geknaboj

De la 4a ĝis la 11a de majo 2013

Se vi aĝas inter 8 kaj 17 jarojn,
kaj kapablas (iom aŭ jam bone) paroli en esperanto,
Se vi emas vojaĝi, viziti Parizon kaj alian belan regionon de Francio, konatiĝi kun novaj geamikoj, kunloĝi en kastelo,
Se vi ŝatus ĉu muziki, ĉu kanti, ĉu danci, teatraĵi, ...
aŭ iel krei belajn aĵojn,

Tiu semajno ege plaĉos al vi !

Eble vi scias, eble ne, ke **fringo** estas birdeto kiu gaje kantas printempe (vidu la bildon aliflanke). Ĝuste fringoj, abundas en la bela parko (arbareto) kiu ĉirkaŭas la kastelon.

Sed kio estas FRINGOJ ?

Temas pri novstila aranĝo por infanoj kaj gejunuloj, 8/17 jaraĝaj esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj. Ĉi-jare okazos la 5a eldono de FRINGOJ

Koncepto :

Dum unu semajno, kunvivas grupetoj el diversaj landoj en la kastelo kaj preparas spektaklon. Tiu spektaklo okazos antaŭ loka publiko, esperantista aŭ ne, **la vendredon 10an de majo**.

La E°-instruist/antoj, proponas kiel eble plej diversajn aktivaĵojn (aŭ "atelierojn"), inter kiuj la infanoj, sendepende de kiu lando ili venas, povas elekti la plej allogajn por si.

Ekzemploj de aktivaĵoj jam proponitaj dum la antaŭaj FRINGOJ : orkestreto, dancoj (popolaj aŭ aktualaj), skeĉoj, teatraĵoj, « magio » (prestidigitado), korusaj kantoj, ombro-teatraĵo, lum-ĵonglado, fabrikado kaj animado de teatropupoj...

Krom la lerno-grupoj, **ankaŭ unuopaj infanoj** aŭ gefratoj, gekuzoj, rajtas partopreni. **Interkonsento necesas inter la gepatroj kaj samlingva responsulo partoprenonta.**

Programo :

Antaŭ-FRINGOJ : La eksterlandaj grupoj alvenos 1 aŭ 2 tagojn antaŭ la aranĝo kaj povos viziti Parizon gvidataj de lokaj E-istoj. Necesas averti pri la alven-dato kaj rapide interkonsenti kun mi pri **loĝ-kondiĉoj** (kiel eble malmultekostaj) en Parizo aŭ apude. Kelkaj (minimume 12) dorm-lokoj estos ĉe esperantistoj.

FRINGOJ-semajno :

- La sabaton 4an, frumatene, buso (kun ŝoforo) disponigita senpage de mia urbo Bondy (tute apude de Parizo), veturigos ĉiujn al Kastelo Grezijono, kiun ni atingos antaŭ la tagmanĝo.
- De la dimanĉo ĝis la ĵaŭdo, disvolviĝos la aktivaĵoj por prepari la spektaklon, kaj aliaj distraĵoj por la infanoj.
- La vendredon matene okazos la ĝenerala provludo de la spektaklo. Posttagmeze, ni finpreparos la salonojn, la ekspozicion... Ekde la 17a, alvenos la publiko : vizito de la ekspozicio, babilado kun organizantoj, instruistoj, eĉ infanoj (tiuj kiuj ne tro streĉiĝos pro la scenej-timo ;-)
- La spektaklo komenciĝos je la 18a.
- Post la spektaklo, okazos vespermanĝo, eble kun kelkaj vizitantoj, kaj poste, la korŝiraj adiaŭoj jam komenciĝos (foriros veturile aliregionaj infanoj kun siaj gepatroj).
- Sabaton matene : valizoj, ordigado, purigado...
- Tuj post la tagmanĝo, ni ekveturos per buso, revene al la pariza regiono, fakte al Bondy.

Post-FRINGOJ : Tie, en jam rezervita salono, okazos la "Reveno de FRINGOJ" : festeto kun vespermanĝo (bufedo) preparita de geamikoj de la asocio Bondy-Esperanto, gepatroj de miaj lernantoj kaj simpatiantoj. Sur scenejo, la infanoj povos montri partojn de sia spektaklo. Ni invitos reprezentanton de la urbestro, fotiston kaj ĵurnaliston, planante aperigon de artikolo en la urba gazeto. Nokte, reveno al hotelo, loĝlokoj, aŭ veturado al stacidomo, flughaveno, laŭ la programo de ĉiu grupo. Dimanĉe, la grupoj kiuj restis en la pariza regiono, turismos laŭplaĉe, gvidataj de esperantisto(j).